

# La Espero

1974 - 4

Svenska Esperantotidningen

Fondita en 1913

## BORLÄNGE - FOLKLORO - LABORO

La etoso de Dalekarlio — folkloro, popoldancoj, tradicio — regis ĉe la jarkongreso de SEF en Borlänge dum la pentekosto. Jam la funkcioj je la kongresoficejo portis naciajn (t. e. provincajn) kostumojn same kiel s-ro Lagerkrantz, kiu bonven-salutis por LJK dum la solena malfermo, kaj tuta orkestro — Muzika rondo de Södertuna — ludis je la solena malfermo, dum la bankedo kaj kelkaj el ili eĉ dum la distra vespero.

Ne kreu, tamen, ke la jarkongreso nur dediĉis sin al romantiko kaj malnovaj tradicioj en tiu fama provinco, ĉar tiu jarkongreso eble pli ol multaj aliaj dediĉis longan tempon al realeca diskutado pri tre konkreta demando: informado.

### SOLENA MALFERMO

La inaŭguro en la Pentekosta Sabato okazis laŭ maniero, por ni jam tradicia. S-ro Lennart Lagerkrantz el Falun oficiale bonvenigis en la nomo de LJK. Li citis Kalocsay, kiu en iu verko diris, ke ni devus komenci la historion de esperanto per la vortoj: "Komence estis la sento!" — S-ro Lagerkrantz daŭrigis: "Jes, vere, la sento naskis nian lingvon, ne iu seka scienculo. Nia majstro, kiel artisto, skulptis la lingvon, ĉizante kaj glatigante ĝin, ĝis fine ĝi aperis kiel perfektigita kreaĵo, enhavanta ne nur flekseblecon kaj harmonion, sed ankaŭ dolĉan ĉarmon, afablan humoron kaj virtuozan belsonecon."

La SEF-prezidanto s-ro Strönné, aludante al la grava rolo de Dalekarlio por la historio de Svedujo, konstatis, ke ĝi havis kaj daŭre havas grandan signifon ankaŭ por la esperantomovado. Li dankis al la komitato pro ilia granda laboro kaj transdonis al ĝia prezidanto, s-ro Lundvall en Borlänge, la — ankaŭ tradician — esperantan standardeton.

### BANKEDO

En Borlänge oni denove sukcesis aranĝi la bankedon en aparta ĉambro — en iuj jarkongresoj oni tion faris en la grandaj festsalonoj, kie ĉeestas pli da eksteruloj ol esperantistoj kaj en kiuj ludis laŭtaj modernaj orkestroj, kiuj kompreneble tre ĝenis — kaj ni povis trankvile ĝui de la manĝo kaj de la salutparolado de la oficiala reprezentanto de la urbo Borlänge, la prezidanto de la komunuma kultura komitato. Salutis ankaŭ kelkaj eksterlandaj gastoj.

### DISERVO

En la antaŭtagmezo de la Pentekosta Dimanĉo okazis la jarkunveno de SEF, kaj pri ĝi ni raportas en aparta artikolo en tiu ĉi numero. Tuj post la lunĉo oni povis viziti ia Di-servon, kiun aranĝis KELI (ekster la kadro de la oficiala programo de la jarkongreso) en la Misia Preĝejo. Predikis s-ro Erik Carlén, kiu parolis pri la graveco kulturaj pensojn. Se estas tiel, kiel kelkaj scienculoj asertas, ke niaj pensoj influas al la kreskaĵoj, al niaj hejmaj floroj, en kia grado ili do influas al la homoj ĉirkaŭ ni? Se ne nur niaj vortoj, sed ankaŭ niaj pensoj influas al niaj kunhomoj, nia medio, kiom granda do ne estas nia respondeco!

Kelkaj predikantoj, eĉ je la Di-servoj dum niaj esperantokongresoj, ŝvebas kvazaŭ "alte en la aero", parolante pri nebulaj teologiaj subtilaĵoj. Ili malofte havas kontakton kun siaj aŭskultantoj kaj iliaj vortoj preskaŭ tuj perdiĝas. Aliaj parolas pri konkretaj aferoj, tuŝas la ĉiutagajn problemojn de la aŭskultantoj, kaj ili parolas per simplaj, ĉiutagaj vortoj. Iliaj diroj ne perdiĝas, ili enpenetras profunde en la korojn de la aŭskultantoj kaj kelkaj eble neniam forgesas ilin. Carlén apartenas al tiu dua speco da predikantoj!

## NOVA PREZIDANTO DE UEA

Je la Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, profesoro Ivo Lapenna, ekŝigis el ĉiuj siaj funkcioj en UEA. Nova prezidanto fariĝis Humphrey Tonkin, kiu antaŭ kelkaj jaroj estis prezidanto de TEJO, la gejunula organizaĵo. Li naskiĝis en Anglujo sed loĝas en Usono, kie li estas profesoro pri la angla lingvo ĉe la Universitato de Pennsylvania.

Vic-prezidanto anstataŭ s-ro Carlén (vidu nian raporton pri la jarkunveno de SEF en Borlänge) fariĝis D-ro W. Bormann, Hamburgo. Okazis ankaŭ kelkaj aliaj ŝanĝoj en la estraro de UEA.

La sekvontjara Universala Kongreso okazos en Kopenhago.

Pri la kongreso en Hamburgo raportos en la venonta numero — laŭ nia peto svedlingve — nia kunlaboranto Karl Gustafsson el Söderhamn.

### EKSKURSO

En tiu posttagmezo ne okazis — kaj jen oni rompis la tradicion de la plej multaj antaŭaj jarkongresoj — pritraktoj, prelegoj aŭ diskutoj. En tiu posttagmezo oni ekskursis. Unue al la turista hotelo de Insjön por kaftrinkado. Tie denove ludis la muzikistoj el Södertuna. Poste al la Teksejo Masen, kie eblis ne nur rigardi la teksilojn sed ankaŭ aĉeti belajn teksaĵojn kun dalekarliaj motivoj.

Poste la aŭtobusoj veturigis nin al Siljansnäs kun ĝia mirinde bela panoramo de Lago Siljan kaj la dalekarlia pejzaĝo. La veterdiroj evidente ne kutimiĝis al la ŝanĝo de la tradicio, ĉar en tiu posttagmezo kiam la jarkongresanoj kutime havas endomajn kunvenojn, estis griza vetero



kaj pluvado. Sed interne en la bela Hotelo Siljansnäs oni servis bongustan te-supeon kaj montris artan filmon pri la tradicia provinco. Ludis la muzikistoj de Södertuna denove, kaj agrabla surprizo estis la du filinetoj Posthuma el Västerås, kiuj tute kaptis la kongresanojn per kelkaj ĉarme prezentataj kantetoj.

#### LA URBO BORLÄNGE

Certe estis tre bona medio por la jarkongreso. Kiel kutime dum la lastaj jaroj oni aranĝis tiel, ke la partoprenantoj loĝis kaj manĝis en unu sama loko, nun en Hotelo Brage, luksa kaj komforta kun bongustaj manĝoj. Tiu urbo, kiun oni eble tro ofte nur preterpasas survoje al pli famaj turismaj lokoj en la provinco, fakte havas tre belan centron, kiun karakterizas speciale la multaj ek-



Nelaciĝebla vojaĝanto: Anna Alamo-Sandgren.

zemploj de moderna arto, kiun oni trovas en la stratoj kaj placoj. Borlänge evidente estas unu el tiuj multaj komunumoj, kiuj multon elspezas por plibeligi siajn centrajn partojn, tiamaniere ankaŭ apogante junajn artistojn. Tio eble atestas, ke Dalekarlio ne estas nur provinco de tradicio kaj turismo, sed ke ĝi ankaŭ hodiaŭ estas aparte favora regiono por arto kaj kulturaj aktivecoj.

Ni esperantistoj el diversaj partoj de la lando sentis nin hejme en Dalekarlio, ni dankas pro bonege aranĝita jarkongreso kaj volonte revenos al vi.

Kaj sekvontan jaron ni vidos unu la alian je la okcidenta marbordo, en Halmstad!

A. B.

## Redaktoro:

La Universala Kongreso en Hamburgo fariĝis por la internacia esperantomovado evento, kiun oni rajtas nomi historia, pro la elekto de nova prezidanto kaj aliaj gravaj ŝanĝoj en la estraro de UEA.

Tiu ŝanĝo ja ne okazis sen konfliktoj; malpacigoj inter personoj kaj grupoj. En artikolo ĉi-sube Ulla Luin, membro de la Komitato de UEA, provas pilumigi la okazaĵojn dum la lastaj jaroj.

En la organo de UEA, en la memstara Heroldo kaj en kelkaj aliaj gazetoj aperis dum kelka tempo artikoloj kiuj atestis pri malakordo en la gvidantaj rondoj de nia movado. Ankaŭ ni ricevis artikolojn, kiujn oni petis nin publikigi. Ni tion rifuzis, ĉefe pro du kaŭzoj: La spaco de La Espero ne permesas longajn artikolojn kaj diskutojn pri la gvidado de la internacia movado, kaj tiuj el niaj legantoj, ĝenerale nur la plej aktivaj esperantistoj, kiuj interesigas pri la afero, povas sekvi la diskutadon en la internacia gazetaro.

Nur unu escepton ni faris: kiam Ulla Luin pasintan jaron prezentis la novan laborplanon de UEA profesoro Lapenna sendis artikolon, en kiu li prezentis siajn vidpunktojn pri tiu laborplano. Kompreneble ni aperigis ĝin, la tiama prezidanto de UEA devis havi la rajton en tute demokrata ordo konigi sian opinion al la legantoj de ĝuste tiu gazeto, kiu prezentis la laborplanon el la vidpunkto de U. L.

La ĉi-suba artikolo de Ulla Luin estas la dua escepto; ni opinias ke nun — kiam jam okazis grava ŝanĝo — estas nia devo mallonge informi pri la afero. "Ni" signifas en tiu ĉi kazo la redaktoro mem, ĉar U. L. donis al ni liberajn manojn kaj la estraron de SEF ni ne konsultis.

Multaj esperantistoj bedaŭras la okazaĵojn kaj estas surprizitaj, ke en movado kiu finfine celas interkompreniĝon internacian povas okazi tiom da personaj konfliktoj kaj malpacigoj (Tiaj fakte okazis jam dum la unuaj jaroj kaj poste tra la tuta historio de la esperantomovado).

Bedaŭri tion oni ja rajtas, sed ĉu vere estas tiel strange? Tiajn konfliktojn ni vidis en Svedujo en multaj aliaj organizaĵoj, eĉ interne de kristanaj organizaĵoj. La esperantomovado konsistas el homoj plej diversaj, el plej diversaj medioj, kun tre malsimilaj vivspertoj kaj vivkonceptoj. Ĉu ne estas des pli rimarkinde ke en tiu malhomogena grupo, kies membroj estas disvastigitaj tra la

tuta mondo, entute eblis krei fortan komunan organizaĵon? Ĉu tio ne atestas, tamen, pri la forteco de la internacia lingvo kaj la esperantomovado?

*Ulla Luin*

## Komitato de UEA

Konfuzigaj estis la lastaj monatoj. Ekde aprilo la membroj de UEA povis vidi, ke io okazos en la kunsidoj de la komitato de UEA en Hamburgo. Du ĉefaj demandoj ekscitigis la mensojn: la demando pri prezidanteco de UEA, kun la kunligitaj demandoj pri malintegriĝo kaj neŭtraleco, kaj la demando pri la financa stato de UEA.

Mi provos skizi la malantaŭaĵojn de la okazaĵoj. Ĉar ne multaj povis eviti preni starpunkton al la demandoj, ankaŭ mia raporto ne povas esti plene objektiva.

#### Antaŭ tri jaroj

La historio komenciĝas jam antaŭ tri jaroj, en la kongreso de Londono.

En Londono oni reelektis la prezidanton, sed kun tre malgranda margeno. La kontraŭkandidato ricevis nur iom malpli da voĉoj. Sed estis multaj sindetenoj, aŭ "blankaj" voĉoj, kaj estis facile vidi ke se oni havus alian kontraŭkandidaton, kaj se tiu kontraŭkandidato ricevus ankaŭ la blankajn voĉojn, li estus la nova prezidanto.

Evidente la komitato de UEA deziris novan prezidanton, sed sentis mankon de taŭga kandidato.

Ioma rejuniĝo de la tuta estraro estis ankaŭ bezonata. Krome, en la estraro elektita en Londono la kontraŭstaroj estis tro grandaj.

En tia situacio estis elementa demokratia rajto komenci pripensi taŭgajn kandidatojn, kaj labori por ke ili estu akceptataj. Tia laboro ankaŭ okazis, ne nur flanke de la "opozicio", sed ankaŭ flanke de la prezidanto kaj la estraro mem, kvankam en diversajn direktojn.

#### Malintegriĝo kaj neŭtraleco

Tiuj laboroj subite fariĝis publikaj kunlige kun la elektoj de komitatanoj B, kiujn la delegitoj elektas. En aprilo aperis longega artikolo en Revuo Esperanto, kun minacoj pri malintegriĝo de UEA, tuj antaŭ la tre malfruigitaj elektoj de komitatanoj B. La artikolo havis efikon: kvin el la ses elektitaj komitatanoj B estis kandidatoj de la prezidanto.

La publiko estis denove tuŝita de



la okazajoj dum la kongreso, kiam okazis duhora persona deklaro de la prezidanto.

Unu el la ĉefaj argumentoj kontraŭ ŝanĝo de prezidanto temis pri neŭtraleco. Cirkulis onidiroj ke la opoziciantaj grupoj estus direktitaj el Moskvo, ke okazas komunista komploto, kaj ke ĝi celas al detruo de la financoj kaj de la tuta organizo de UEA.

Nu, oni rekonas tiun argumenton el la 50-aj jaroj, kiam el diversaj flankoj homoj akuzis tutan UEA je komunismo pro tio ke ĝi havas landajn asociojn en orienta Eŭropo.

Kiel vi certe jam legis, la komitato elektis novan prezidanton per granda plimulto — eĉ pli granda ol oni povus supozi post la elektoj en Londono.

### Krizaj financoj

La dua kriza demando ĝuste nun estas la financo de UEA. Post la nekontentiga situacio de la Centra Oficejo en 1973, montriĝis neatendite grandega deficiito. Okazis jam foje jantaŭe simila deficiito, almenaŭ se oni konsideras ke la inflacio nun grandigas ĉiujn ciferojn.

Sed la pli danĝera afero estas, ke oni nun antaŭvidas same grandan deficiiton por 1974 kaj ankaŭ por 1975. Nun estas jam tro malfrue por povi tute savi la jaron 1974, kaj eĉ por 1975 oni devas tre rapide agi. La novelektita estraro do staras meze en tuta aro da malfacilaj problemoj.

La kaŭzoj de la deficiito 1973 estis unue la altiginta nivelo de salajroj, kombinita kun la malfacilaĵoj en la oficejo. Por solvi tion, la estraro verŝajne devos parte reorganizi la administradon, unuavice per raciigoj.

Aliaj kaŭzoj de deficiito estis ke oni tro optimisme taksis la enspezojn de la kongreso en Beograd kaj la enspezojn pro preslaboroj.

### Konkludoj

Per tiu ĉi kongreso finiĝis epoko en la historio de esperanto: la epoko Lapenna. Mi ne intencas resumi ĝin, ĉar por tio necesas multe pli da spaco. Mi nur diru ke en la lastaj jardoj estis establitaj kelkaj gravaj agadlinioj, kiujn necesas daŭrigi kaj evoluigi.

La ŝanĝoj kiuj okazis estis marge-naj: pluraj el la novaj estraranoj jam estis en la malnova estraro, kaj la plejparto de la komitatoj estas la samaj kiel antaŭe. La nova estraro promesis plulabori sur la jam ekzistanta bazo, kaj speciale akcentis ke la koncepto pri aktiva neŭtraleco daŭre restas tiu sama.

Sed sen daŭraj margenaj ŝanĝoj neniu organizo povas vivi.

La nova akcento de la nova estraro troviĝas je pilargigo de la laboro de la estraro. La estraro serĉas la kunlaboron de plej eble multaj aktivaj esperantistoj.

Kaj tiun pilargigon mi persone deziras subteni. La plimulto de la esperantistoj estas inteligentaj, scias bone prijuĝi siajn proprajn kapablojn kaj la kapablon de aliaj, ne laciĝas la-

bori eĉ dum senesperigaj kondiĉoj, kaj tenas sin bone informitaj. La malagrablaj eventoj de la lasta kongreso nur plifirmigis tiun ĝeneralan impreson.

Ulla Luin

## La forgesita ŝlosilo

Radio-amatoro DK2 UQ babilas pri amuza travivaĵo en la vicjoj de la radio-amatoroj.

Iu dommastrino foje lamentis:

"Iam mi forgesis miajn dom- kaj loĝej-ŝlosilojn hejme. Post la aĉetado en la urbo mi revenis. Mia edzo estis hejme, mi sonorigis, sed mia edzo ne malfermis la pordon. Kial? — Li estas radioamatoro, kaj tio diras jam ĉion!

Oni povas voki kaj bati al la pordo, — sed — li aŭdas nenion, ĉar li rajdas sur la mallongaj ondoj!

Kion do fari? Mankis al mi la dom-ŝlosilo, kaj sur la strato estis malvarme. Nu, mi iris al nia najbaro, kiu estas radioamatoro kiel mia edzo, sed, dank' al Dio, ĝuste en tiu ĉi momento li faris paŭzon. Li estis preta telefoni al mia edzo, sed tiu ne aŭdis la sonradon.

— Tion mi povis kompreni — diris la najbaro — certe li havas grandiozan radio-kontaktan.

— Povas esti, mi respondis ĉagrenite, — do — enŝaltu vin, mi petas, ĉar mi volas fine eniri la domon.

— Ho, ne — respondis la najbaro — tion mi ne rajtas fari, ĉar neniu radioamatoro devas interrompi iun alian kontakton. Povas esti, ke en la momento via edzo parolas kun amatoro en la alia duono de nia terglobo, kaj mi estas al li bona najbaro. Sin enmiksi en la paroladon — tion povas provi nur iu, kiu loĝas tre malproksime. Mi konas iun radio-amatoron, kiu loĝas en Honolulu. Dumtage li kulturas ananas-fruktojn, vespere radioamatoras. Atendu iomete, mi petas.

Nia najbaro estis nun mem entuziasmigitaj, sed Honolulu ne sufiĉis. Baldaŭ estis en la ĉambro preskaŭ ĥaoso de vok-signo, de voĉoj kaj de morsaj-signoj. Multaj el la transmarraj amatoroj klopodis helpi min el la foraj landoj kaj atingi mian edzon per iu, sed ĝusta, mallonga ondo.

Baldaŭ estis konstruita radio-ponto trans kontinentoj kaj maroj.

Kaj poste?

Mia edzo ricevis fortajn admonojn per la etero, — mi memoras, ke el Kalifornio.

Mia edzo pentoplene malfermis la dompordon.

Sed mi, — mi devis tamen ridi. Li devis iri nur 200 paŝojn ĝis la dompordo, sed la afero pri la forgesitaj dom- kaj loĝej-ŝlosiloj iradis ĉirkaŭ la terglobo, de unu amatoro al la alia.

Trad. W. K.

(El INTERLIGILO, Bulteno de l'Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio)

## RADIO

Flera utlandska radiostationer sänder regelbundet på esperanto. Fullständiga uppgifter finner du i UEA:s organ ESPERANTO eller i HEROLD. Här nedan vill vi bara göra dig uppmärksam på några av de intressantaste stationerna:

### POLEN

Polska radion har dagligen tre sändningar på esperanto om vardera cirka 30 minuter, nämligen kl. 6.00, 16.30 och 22.30. Den tidiga sändningen går på våglängderna 31 m, 49 m och 200 m, kl. 16.30 på 31 m och 49 m och den sena kvällsändningen på 49 m och 200 m. Mycket varierande program.

### SCHWEIZ

Den schweiziska radion sänder korta program (5 minuter) fyra gånger i veckan: måndag och onsdag kl. 13.20, torsdag och lördag kl. 22.45, våglängd 75,28, 48,66 och 31,46.

### JUGOSLAVIEN

Radio Zagreb sänder varje vecka, natten mellan fredag och lördag, med början fem minuter efter midnatt (0.05) på 264 meter. Stationen hörs i regel mycket bra och programmen är förstklassiga.

### ÖSTERRIKE

Wien varje lördag kl. 17.45 på 48,7 m.

### NOVA PROPONO POR LA EDUKO DE GASTLABORISTOJ

En Bavario oni lanĉas novan eksperimentan programon por la infanoj de gastlaboristoj, laŭ anonco de la Ministerio pri Eduko. Komence de la nuna lerneja jaro, oni per ilia propra lingvo instruos infanojn, kiuj ne kapblas sekvi instruon per la germana lingvo, aŭ kies gepatroj elektos instruon per la gepatra lingvo. En tiaj klasoj oni instruos la germanan kiel fremdan lingvon. Tiujn infanojn, tamen, kies gepatroj intencas resti longan periodon, oni integrigos en la germanan edukistemon, tuj kiam ili sufiĉe bone posedos la germanan lingvon. Pri la gepatra lingvo ili ricevos kvar aŭ kvin horojn da instruo ĉiusemajne. La Bavaria Ministerio pri Eduko kunlaboros kun la instancoj en la patrujoj de la gastlaboristoj por varbi instruistojn por la eksperimento.



# La jarkunsido de SEF

La ĉefa parto de la jarkunsido de SEF okazis kiel kutime en la antaŭtagmezo de la Pentekosta Dimanĉo kaj — ankaŭ kiel kutime — ĝin gvidis rutine kaj verve s-ro Curt Alf el Norrköping, kiu en la antaŭa vespero estis elektita prezidanto por la jarkunsido. Oni konstatis ke ĉeestis 30 rajtigataj reprezentantoj de kluboj kaj distriktoj + la estraro, sed la salono estis fakte plenplena, kio signifas, ke ankaŭ aliaj kongresanoj montris ĝojindan intereson.

La jarkunsido estis fakte sufiĉe vigla kaj pritraktis plurajn gravajn demandojn, kaj certe ĝi meritis pli grandan spacon kaj pli detalan raporton sed pro konataj kialoj ni povas tie ĉi elekti nur iujn punktojn el la relative ampleksa tagordo. Ni anticipe pardonpetas al tiuj legantoj-partoprenintoj kiuj eble konstato, ke ni preterlasis gravajn aferojn, ĉar ankaŭ por ni la elekto kaj la mallogigo de la raporto estis malfacilaj.

La dekpaĝa jarraporto estas resume prezentita jam en la pasinta numero de La Espero. La ekonomia raporto montris deficiton de ĉirkaŭ ok mil kronoj. El la elspezoj. 40 mil kronoj, La Espero postulas proksimume 50 %. La kasisto tamen atentigas, ke la konto por Informado, kiu ne estas inkludita en la Rezultatkonto, montris gajnon de preskaŭ ses mil kronoj, kaj ke la kostoj por La Espero inkludas sep numerojn, nome ankaŭ la lastan numeron de 1972. Krome la translokigo de la ejo postulis ekstrajn kostojn. La ekonomio sekve estas kontentiga se oni konsideras la cirkonstancojn, sed kompreneble la kostoj, pro la ĝenerala inflacio, altiĝos dum tiu ĉi jaro.

Je la elektoj okazis kelkaj gravaj ŝanĝoj. La prezidanto s-ro Jan Ströme estis unuanime reelektata, sed la vicprezidanto s-ro Ragnar Hjorth, kies tempon postulas multaj aliaj gravaj okupoj, estis liberigita de tiu posteno. Ĉar oni tamen ne volas perdi la grandajn spertojn kaj kapablon de Ragnar Hjorth li restas en la estraro kiel anstataŭanto. La ĝisnuna anstataŭanto s-ro Märta Andréasson fariĝis estrarano, kaj s-ro Gunnar Farm fariĝis nova anstataŭanto post s-ro Nils Johansson, kiu eksigis. Ĉu konfuzige? Bonvolu rigardi la kompletan liston de la nova estraro aliloke en tiu ĉi numero!

Alia grava ŝanĝo estas, ke s-ro Erik Carlén eksigis kiel komitatano A. de UEA. Lin anstataŭigas s-ro Ulla Luin.

Tio signifas, ke Carlén forlasos la postenon de vic-prezidanto de UEA (kio verŝajne nun okazis je la UK en Hamburgo, okazinta post la verkado de tiu ĉi raporto sed antaŭ la apero de tiu ĉi numero) kaj la federacia prezidanto Jan Ströme varme kaj sincere dankis al Carlén pro lia multjara sindona kaj fruktodona laboro en la estraro de UEA. Li esperis, ke la sveda movado, kiu ankaŭ bezonas la kapablojn de s-ro Carlén, nun profitos el la fakto ke li havos pli da tempo. S-ro Carlén gratulis al s-ro Luin kaj deziris al ŝi sukceson en respondecata kaj malfacila posteno.



**Mangopaŭzas ges. Lagerkrantz, en la fono s-ro Aberg.**

Kvar proponoj estis pritraktataj de la jarkunveno, unu de la Esperantoklubo de Kungälv, du de la klubo de Västerås kaj unu de Oskar Svantesson. La proponoj de Västerås, kiuj temis pri sistema agado por instigi la urbojn en Svedujo eldoni turismajn prospektojn kaj pri starigo de Laborgrupo por esplori la agadojn de la grandaj nacioj por disvastigi siajn lingvojn estis ambaŭ favore pritraktataj, sed la jarkunsido konstatis, ke estas malfacile por la estraro de SEF dediĉi sin al novaj kampanoj en la nuna momento. Pri la financigo de la nova sved-esperanta vortaro ni raportas aliloke.

La propono de Oskar Svantesson celis, ke la estraro havu la komision esplori "ĉu estas eble pli ofte ol ĉiun duan monaton informi la svedan esperantistaron pri la agado en la estraro kaj en la diversaj lokoj tra la lando por disvastigi la lingvon, kaj ke la jarkunveno rajtigu la estraron ĉesigi la aperon de La Espero ekde la 1-a de januaro 1975". Li ankaŭ proponis ke oni ekde 1975 "ne plu kunkuplu abonon de La Espero aŭ alia informilo oficiala kun la membrokotizo de SEF". S-ro Svantesson, kiu ne mem ĉeestis — pro tute akcepteblaj kialoj; li festis sian 70-an naskiĝtagon ĝuste en tiu tago — akcentis, ke li "ne celas la skalpon de la redaktoro ĉar la nuna aspekto kaj redaktado de La Espero estas laŭ mia opinio

senriproĉindaj". Li opinias tamen, ke la kosto por la gazeto kaj la malofteco de la apero estas nekontentigaj, kaj proponas multobligitan organon aperanta dufoje monate.

Tiu propono okazigis diskutadon pri la gazeto. La redaktoro Ake Blomberg diris, ke Svantesson evidente preferus multobligitan informilon simila al lia "Mundo", kiu fakte bone funkcias por la esperantistoj en la regiono de Göteborg kaj okcidenta Svedujo. Blomberg tamen opiniis, ke ni devas pensi ne nur pri la aktivaĵoj de nia movado, sed ankaŭ pri tiuj kiuj estas nur "uzantoj". La aktivaĵoj eble kontentigus kun multobligita cirkulero, sed tiuj kiuj lernis esperanton sen la intenco aktive labori en niaj organizaĵoj — kaj ni bezonas ankaŭ ilin — deziras ion pli, kaj ili bezonas ian rekompencan por sia membrokotizo. Se ni forigus el ĝi La Esperon, kion ni anstataŭ donu al ili?

La estraro opiniis, ke la gazeto nuntempe funkcias regule kaj fideinde. Svantesson proponas sistemon kiu postulas multe da laboro kaj kiu estas malpli fideinde. "Tiun laborforton ni bezonas por produkti ekzemple flugfoliojn."

La jarkunsido malakceptis la proponon.

La diskutado pri la gazeto enhavis ankaŭ aliajn erojn. S-ro Wim Posthuma deziras svedlingvan resumon post esperantlingvaj artikoloj, simile al la sistemo de la dana Eŝo.

La redaktoro konsideris tiun proponon pripensinda, sed kelkaj partoprenantoj protestis, dirante ke komencantoj ĝenerale bezonas kaj deziras ne svedan sed esperantan tekston.

S-ro Alf, fermante la jarkunsidon, dankis al la federacia prezidanto kaj al la tuta estraro pro ilia sindona laboro por nia movado, kaj antaŭ tio la jarkunsido danke akceptis la inviton de la klubo de Halmstad por la jarkongreso 1975.

Obo

## Nova libro-listo

de la dana Esp-eldonejo ĵus aperis. Ĝi estas 12-paĝa kaj ampleksas pli ol 50 titolojn, preskaŭ ĉiuj kun klišo-desegno. Sur paĝo 2 troviĝas la plej novaj eldonoj, i. a. 2 libroj por geknaboj kaj la klasikaj de nia fama stilisto KABE: Patroj kaj Filoj" de Turgenjev, kaj "La Lanternisto kaj aliaj prozaĵoj" de diversaj polaj verkistoj. La libro-listo estas senpage havebla ĉe Dansk Esp-Forlag, Ingemannsvej 9, DK-8230 Åbyhøj, Danlando.



# Diskutado pri informado

Oni povus kredi, ke kiam la ekskurso estis okazinta jam en la posttagmezo de la dimanĉo, ne multaj trovus inde resti ĝis la Pentekosta Lundo por novaj endomaj pritraktoj. Sed kiam Ulla kaj Franko Luin en tiu mateno enkondukis sian programon pri informado, la salono estis preskaŭ plenplena kaj la intereso ĝojinde granda. Ŝajnas al la raportanto ke la ideo interrompi la kunvenojn por ekskurso kaj distrado en la dua tago kaj dediĉi la antaŭtagmezon de la lasta tago al gravaj temoj montriĝis sukcesa kaj tute ne detruis la efikecon de la jarkongreso.

Ulla kaj Franko prezentis tiun pakajon pri informado pri kiu vi jam pli frue povis legi en *La Espero* — vidu ekz. nron 3 de tiu ĉi jaro — kaj tie ĉi mi ne volas denove ripeti la enhavon. Sed laŭ la komentoj de la ĉeestantoj ŝajnas tute evidente, ke tiu ĉi informa programo kun afiŝoj, flugfolioj, broŝuroj, estos efika helpilo por la estonta agado de la kluboj kaj ke ĝi povos havi grandan signifon por la esperantomovado en Svedujo.

Kaj dum la grupa laboro kaj dum la posta komuna kolektiĝo la diskutoj estis viglaj kaj la intereso de la ĉeestantoj granda.

## INFORMADO PRI LA SKOLTA JAMBOREO

Kiel speciale invitita gastopartoprenis la tutan jarkongreson s-ro John Berggreen, Oslo, estrarano de la Norvega Esperantista Ligo kaj prezidanto de la Skolta Esperanto-Ligo (tutmonda).

Jam dum la solena malfermo en la Pentekosta Vespero, s-ro Berggreen faris la festan paroladon, en kies unua parto li resume memorigis pri la fundamenta strukturo de esperanto kaj la bazaj ideoj de nia movado. D-ro Zamenhof mem", li diris, "ne konsideris esperanton kiel nur praktikan solvon de la lingvo-ĥaoso. Li vidis ankaŭ idealistan flankon, la internan ideon. 'Konsideru la homaron unu familion', li diris. Oni devas eduki la junularon batali por vero, bono, ĝusteco kaj frateco."

S-ro Berggreen datrigis: "Precize la samajn idealojn havas alia granda tutmonda movado, tiu de la skoltoj. La skoltoj — mi parolas pri la neŭtralaj, nepolitikaj skoltaj organizaĵoj — nun ekzistas en 104 landoj kaj nombros 20 milionojn. Ili havas viglajn internaciajn rilatojn, precipe dum la grandaj internaciaj tendaroj, la jamboreoj, kiuj okazas ĉiun kvaran jaron.

La sekvonta jamboreo okazos en la somero de 1975 en Lillehammer en Norvegujo, kie kolektiĝos 15.000 knaboj skoltoj el centoj da landoj, kaj kie oni parolos 60—70 diversajn lingvojn. Imagu, kian utilon havus tiuj jamboreoj de unu neŭtrala, internacia lingvo kiel esperanto!"

En la diskutado dum la Pentekosta Lundo s-ro Berggreen atentigis, ke se ni povus interesigi nur 1% de la skoltoj, ni havus 200.000 novajn esperantistojn, kaj li admonis la lokajn esperantistojn kontakti la skoltajn gvidantojn en la respektivaj lokoj. Tiu agado estas kompreneble speciale grava nun en tiu ĉi aŭtuno, tuj antaŭ la granda jamboreo en nia najbara lando.

## La nova vortaro

En Borlänge oni multe diskutis kaj je la kunsido de la estraro de SEF, je la jarkunsido de Eldona Societo Esperanto kaj je la jarkunsido de SEF pri la eldonota sved-esperanta vortaro, kiu devas anstataŭigi tiun de Jansson/Lindén/Gerdman, baldaŭ elĉerpita.

Docento Ebbe Vilborg laboras jam de pluraj jaroj pri la manuskripto, kaj li ankaŭ ellaboris suplementon al la malnova vortaro, ĉar oni havis la intencan tiun provizore represigi kun suplemento, same kiel oni iam faris pri Plena Vortaro. Montriĝis tamen, ke la plimulto de la partoprenantoj en Borlänge deziras eldonon de komplete nova vortaro anstataŭ provizora solvo kun suplemento.

La problemoj estas la kostoj. S-ro Sjöblom, ĉefo de la eldonejo, atentigis, ke se oni volas kovri la preskostojn, la vendprezo de la nova vortaro estos tiel alta, ke verŝajne neniu estos preta tiel multe pagi. La Esperantoklubo de Kungälv prezentis proponon ke ĉiu klubo garantiu aĉetadon de libroj por minimume mil kronojn, tiel havigante espereble kvardek mil kronojn al la eldonejo. Sjöblom diris, ke kvankam tiu propono en si mem estas bona, ĝi ne prezentas solvon. Ne sufiĉas se la eldonejo havos garantion liveri librojn por kvardek mil kronoj, ke la vendprezo de nova vortaro estu akceptebla oni devas ricevi kvardek mil kronojn **subvencie**, sen ia devo repagi ĉu per novaj vortaroj, ĉu per iuj ajn libroj el la stoko.

Oni tamen fine decidis fari ĉion

eblan por baldaŭa eldono de komplete nova vortaro, kaj la jarkunsido de SEF elektis komitaton, konsistanta el Franko Luin, Märtha Andreasson, Erik Carlén kaj Åke Blomberg, kun Franko Luin kiel prezidanto, kiu komitato esploru la eblecojn per libervola kolektado kaj alimaniere havigi al Eldona Societo kvardek mil kronojn por tiel financi la eldonon de la vortaro.

Por eviti miskomprenon ni fine atentigu, ke eldono de vortaro estas tre granda entrepreno, ke la manuskripto ne estas ankoraŭ preta kaj ke daŭros ankoraŭ kelkaj jaroj ĝis apuros nova eldono. Intertempe la malnova vortaro estas ankoraŭ aĉetebla; la problemoj ne estas ĝia kvalito — ĉar ĝi estas ankoraŭ tute uzbla — sed ke baldaŭ elĉerpiĝos la stoko.

obo

## Upphöj latinnet till nytt EG-språk

*Ett seriöst förslag om att upphöja latinnet till officiellt EG-språk har framkastats av två holländska socialdemokrater i Europaparlamentet. Det kommer ursprungligen från den 71-åriga historikern och ledamoten av franska akademien Jacques Chastenet, som framhåller att latinnet i århundraden tjänat som ett gemensamt språk för Europa. Om språket fallit i glömska borde europeerna lära av Israel, som väckt hebreiskan till nytt liv trots att den inte talats i Palestina sedan Kristi dagar, menar han. (AP)*

Ovanstående återfanns i Dagens Nyheter den 9 april i år. Det borde inte vara obekant för de båda holländska socialdemokraterna i Europaparlamentet att det existerar ett **modern** neutralt språk, som till icke ringa del hämtat sitt ordförråd just från latinnet, Esperanto. I Holland finns det många esperantister, och dit hörde den gamle socialdemokratiska ledaren och regeringschefen Wilhelm Drees.

Men liksom många socialdemokrater i ledande i ställning i Sverige (för all del även andra partier) föredrar man att blunda för det faktum att Esperanto existerar och fungerar utmärkt i praktiken. Det är alltså en nära till hands liggande lösning av världsspråkproblemet. Varför vill man inte acceptera faktum inom arbetarrörelsen? Anses Esperanto inte längre fint nog för dem som kommit en bit upp i partihierarkin?

Åke Blomberg



# La sekretariejo

Depost kelkaj monatoj funkcias la nova sekretariejo de SEF. Ĝi troviĝas en la duone subtera etaĝo de du-etaĝa domo, proksime al la stacio Tallkrogen de la subtera fervojo de Stockholm.

Ciun merkredon oni trovas tie 2—4 personojn, energie laborantaj, inter la 18a kaj 20a horo.

## UNUE MANGI

Kion ni faras tie? Se oni alvenas precize je la 18a horo, oni trovas manĝantojn. Ni venas rekte el niaj laborejoj tien, iom lacaj kaj malsataj. Kiel plej ofte en la esperantomovado, ni devas labori en nia libera tempo.

## POSTO

Iu el la deĵorantoj havigas la poŝton ĉe la poŝtoŝeĉejo survoje. La poŝtoŝeĉejo situas konvene trans la strato.

Poste ni komencas labori.

Unu el ni malfermas la poŝton, stampas alvendaton, dividas ĝin en 5 skatolojn: mendoj de broŝuroj por kluboj, informpetoj, gazetoj, poŝto por la kasisto, kaj poŝto por la sekretario (tio estas ĉio kio ne eniras alian skatolon).

## BROSURMENDOJ

Baldaŭ la dua el ni prenas la broŝurmendojn aŭ la informpetojn, kolektas kaj pakas la menditan materialon, notas sur listo la adresojn de la interesitoj.

Kaj la tria, tio estas kutime mi mem, respondas al la telefono — kutime unu ĝis tri telefonvokoj po merkredo — poste faras liston pri la gravaj poŝtaj informoj al kelkaj el la estraranoj, kaj ordigas paperojn.

## MULTAJ HELPAS

Ne ĉiam la samaj homoj laboras en la merkredvesperoj. Komencis funkcii deĵorvico, tiel ke ĉiuj havas fiksitan merkredon de la monato, en kiu ili venos tien. La listo tamen ne estas ankoraŭ fine fiksita. Kaj pluraj el la deĵorantoj venas ankaŭ dum aliaj semajnoj por deĵori.

Kaj estas ankoraŭ ebleco por pliaj!

## INSPIRO

Ne nur tiuj kiuj loĝas en Stockholm povas helpi en la oficeja laboro. Tiuj kiuj loĝas ekster Stockholm povas helpi donante al ni laboron: broŝurmendojn, gazeteltondaĵojn, membroraportojn, informojn pri la kluba laboro.

Estas pli facile labori, se oni vidas ke la laboro estas dezirita kaj utila.

Ulla Luin

# Nova sekretario de SEF



Finigis ripozaj tagoj...

Tomas Jansson, juna studento pri medicino, kun ekzameno el klasiklingva gimnazio — jen koncentrita bildo pri la multflankeco de la nova sekretario de SEF.

En la esperantomovado li okupiĝis ĉefe pri la eksteraj rilatoj de TEJO, tio estas la kontaktoj kun aliaj organizaĵoj, unu el la plej grandaj laborkampoj de TEJO. Samtempe li estis prezidanto de SEJU kaj estrarano de SEF.

Li transprenos la sekretariajn taskojn iom post iom dum la somero kaj aŭtuno.

Mi mem, antaŭa sekretario, daŭre respondecos pri la funkciado de la sekretariejo. En ĝi partoprenas jam regule pluraj stokholmanoj: Aino Mäkinen, Sven kaj Kerstin Alexandersson, Derk Dam, Marianne Westman, Inga Johansson, Franko Luin, kaj krome aliaj neregule.

Plue, mi intencas dediĉi min iom pli al la interesitoj kaj al la novaj taskoj kiel komitatano de UEA.

Mi deziras multan laboron al mia posteulo!

Ulla Luin

# Universala Ligo revivigis

Goje ni ricevis alvokon pri (re-) aliĝo al UNIVERSALA LIGO kiu sub la devizo "Por Mondpaco per Mondfederacio" laboras por internacia amikeco kaj interkompreno pere de Esperanto. Prezidanto de U. L. Do-cento **H. J. Hendrikssen**, kaj sekretario **Andreo Cseh**.

La adreso de Universala Ligo estas Postbus 334 BUSSUM — 1351 NEDERLANDO. Poŝta ĝirkonto: n-ro 40 88 26.

La jarkotizo estas minimume 5 nederlandaj guldenoj (= 20 steloj). Oni povas pagi al la Nederlanda poŝta ĝirkonto n-ro 40 88 26 pere de la enlandaj poŝtaj ĝirkontoj de aliaj landoj, aŭ al Amsterdam-Rotterdam Bank, N. V. Den HAAG, konto n-ro 43 06 97 708. Ankaŭ per internacia poŝtmandato kaj per bankĉeko. Komprenoble ankaŭ per "Steloj". Efektive ĉiujn pagojn je la nomo: UNIVERSALA LIGO, Postbus 334 BUSSUM-1351 NEDERLANDO.

Al la ĉi-supra informo de nia kunredaktoro T. Morariu ni deziras aldoni, ke Universala Ligo, kiu estis

dum kelkaj postmilitaj jaroj sufiĉe aktiva kaj i. a. eldonis la luksan revuon La Praktiko sed poste pro diversaj malfacilaj cirkonstancoj "mortis", nun evidente revivigis. Ĉar ni opinias ke UL havas grandan taskon kaj ke ĝi povus multon signifi ankaŭ por la tutmonda esperantomovado ni deziras al tiuj samideanoj, kiuj nun revivigis ĝin — inter ili la nelacigebla Andreo Cseh — bonan sukceson kaj varme rekomendas al niaj legantoj apogi la ligon, kiu ne konkurencas kun UEA sed kompletigas kaj riĉigas nian movadon.

Ake Blomberg

En la momento de la presigo alvenis informo de Lennart Åberg, ke svedoj povas samtempe aliĝi al Universala Ligo kaj Sveriges Världsfederalisters Förbund, David Bagares gata 22—24, 111 38 Stockholm. Pagu 20: — sv. kr. al ilia poŝtgira konto (555 50-8) kaj aldonu la valoron de minimume 10 kronojn kun la indiko ke la aldono estas kotizo por UL. La sveda ligo transsendas la pagon al Nederlando. Por la sveda kotizo vi ricevas la revuon Världen och vi.



# MÖRKA KVÄLLAR - STUDIEKVÄLLAR

## ALLAS ANDRA SPRÅK

**ESPERANTO** (E. Malmgren) 9: 40  
Välkänd, lättanvänd, omväxlande och roande lärobok, speciellt gjord för kurser. Läraren kan helt följa läroboken.

★

## ESPERANTOKURS

(F. Lindén) ..... 10: 60  
Mera omfattande lärobok med utförliga grammatiska förklaringar. Särskilt användbar i kurser, där deltagarna önskar ingående studier i Esperanto eller har tidigare språkundervisning. Denna lärobok kräver något mer förarbete av läraren.

★

## ESPERANTO PER POST

Korrespondenskurs (10 brev) 15:—  
Instruktiv, lättfattlig, intressant. Går utmärkt att använda som kursmaterial. Kursdeltagare sänder genom ledaren gemensamt in lösningarna till Esperantoförlagets rättare. Undervisande lärare krävs således ej för denna kurs. En kunnig kursledare kan naturligtvis även själv rätta lösningarna. Var god meddela vid beställningen hur kursen lägges upp.

★

## INTERNACIA ELPAROLO

Uttalsskiva, med texthäfte .... 7: 65  
Modern 33-varvs grammofonskiva, intalad av flera kända internationella röster. Bra hjälp i en nybörjarkurs för inlärandet av rätt uttal.

★

## KORRESPONDERA MED HELA

**VÄRLDEN** (R. Pehrsson) ... 2: 35  
God hjälp och ledning för en nybörjare. Exempel på brevformulering från enkla hälsningar till mera avancerad skriftväxling.

## SVENSK-ESPERANTISK PARLÖR

(R. Pehrsson) ..... 1: 20

**SVENSK-ESPERANTISK ORDBOK**  
(S. O. Jansson, F. Lindén, B. Gerdman) ..... häft. 21: 20  
Fullständig ordbok med många exempel.

## ESPERANTO-SVENSK ORDBOK

(P. Nylén) ..... 18: 80

## LILLA ORDBOKEN

(E. Vilborg) ..... 14: 10

Behändig och modern Svensk-Esp. Esp.-Svensk fickordbok.

★

## EL LA VIVO DE L. ZAMENHOF

(G. Henriksson) ..... 3: 25

Dr Zamenhofs ungdom skildrad i enkla fraser just för nybörjare. En "obligatorisk" bok för alla kursdeltagare.

★

## KORRESPONDENSANNONS

förmedlas av Esperantoförlaget i internationell tidning (Heroldo) .. 10: 50  
Sådan annons kan sättas in redan någon månad. Eftersom det sedan dröjer ung. en månad innan tidningen med annonsen kommer ut, kan kursdeltagare vid den tidpunkten mycket väl föra en enkel korrespondens, t. ex. per vykort. Detta stimulerar och ger bevis på Esperantos användbarhet.

Sådana annonser förmedlas givetvis även till andra internationella tidningar, t. ex. Revuo Esperanto. Priserna varierar därvid.

★

Kursledarna och lärarna bör stimulera elevernas intresse för egen läsning. Detta ger vana och gott ordföråd. Förslag till lätta läseböcker finns i UEA:s årsbok, boklistan. Vi skaffar allt som önskas.

## FORTSÄTTNINGSKURSER

Delar av nybörjarkursen bör snabbrepeteras. Därefter kan man noggrant genomgå

**SVENSK ESPERANTO GRAMMATIK** (E. Carlén) ..... 17: 65

★

Dessutom bör en intressant bok läsas och diskuteras. Boken skall väljas efter kursdeltagarnas förkunskaper. Som första bok föreslår vi:

## VIVO VOKAS

(S. Engholm) ..... inb. 11: 75

En originalroman om ungdom på utomordentlig Esperanto, lätt men perfekt språk. Den mest använda boken för fortsättningskurser.

★

## LA GRANDA AVENTURO

(F. Szilágyi) .. häft. 8: 80 inb. 11: 75  
Trevliga och underhållande noveller, orig. Esp.

★

## NORMANDAJ RAKONTOJ

(G. de Maupassant) ..... 25: 90  
Berättelser från Normandie, övers. R. Dupuis.

För mer Esperantokunniga.

För övrigt kan alla Esperantoförlagets utgåvor rekommenderas för såväl gott språk som intressant innehåll. Boklista sändes gärna på begäran.

★

**MOMS (15 %) ÄR INRAKNAD I OVANSTAENDE PRISER.**

# ESPERANTOFÖRLAGET

Fack 200 42 MALMÖ Postgiro 578-5



# Pär Lagerkvist

*Pär Lagerkvist, nobelpremiito, membro de la Sveda Akademio, unu el niaj internacie plej konataj verkistoj kaj poetoj, mortis antaŭ nelonge. El lia riĉa verkaro bedaŭrinde nur malmulte estas tradukita en esperanton. Ni prezentas la ĉi-suban prozaĵon tiel honorigante la memoron kaj de la granda sveda artisto literatura Pär Lagerkvist kaj nia pli frue forpasinta esperantista artisto Ferenc Szilagy.*

## LA HONORATAJ OSTOJ

Du popoloj estis en granda milito, pri kiu ili ambaŭ estis tre fieraj kaj kiu ankoraŭ vivigis pasiojn tiajn, kompare al kiuj la etaj ĉiutagaj pasioj de la homoj estis kvazaŭ nenio. La postvivinta resto de la popoloj donis sin al tiuj pasioj kun fanatika ardo. Ambaŭflanke ĉe la limo, kie la batalo ondis tien-reen kaj la batalantoj kruele masakrigis, oni konstruis gigantajn memor-monumentojn por siaj falintoj, oferintaj sin por la patrujo, ripozantaj nun en ĝia tero. La homoj pilgrimis tien, ĉiu al sia monumento, tie oni diris ardajn vortojn super la amasoj pri la herooj, kies ostoj dormis sub la humo, sanktigita de heroo morto, altigita en honoro ĝis la eterno. Kaj disvastigis tiam en la du landoj terura famo pri io, kio laŭdire okazis dum la noktoj tie, ĉe la malnova batalejo. Estis fantomoj: la mortintoj levis sin el siaj tomboj kaj transiris la limon, vizitis unu la alian kvazaŭ ili estus repaciĝintaj. Profunde ekscitite oni aŭdis pri tio. La falintaj herooj, la adoratoj de la tuta popolo, vizitis la malamikon, repaciĝis kun li. Estis konsternite!

La du popoloj elsendis po unu komitato por esplori la aferon. Oni embuskis malantaŭ kelke da velkintaj arboj, restintaj tie kaj oni atendis la noktomezan horon.

Terure, estis efektive vero. El la dezerta tero leviĝis timigaj figuroj kaj ili transiris la limon: ŝajnis, kvazaŭ ili portus ion. Oni rapidis al ili plene de kolero:

— Kio? Vi, kiuj oferis vin por via lando, vi, kiujn ni adoras super ĉio, al kiuj ni pilgrimas por soleni kaj memori, kies ripozlokon ni konsideras sankta, vi interfratiĝas kun la malamiko? Ĉu vi repaciĝas?

La falintaj herooj rigardis mire al la komitato:

— Certe ne. Ni malamas unu la alian kiel pli frue. Ni nur interŝanĝas ostojn, tiurilate tute ne estas ordo ĉi tie.

El la sveda: F. Szilagy

Du har vël inte glömt

## ESPERANTO-NYTT

SEF:s fyrasidiga informationsblad. Ut kommer en gång i kvartalet. Kortfattad. Våredigerad. Lämpar sig för spridning bland politiker, skolfolk, bibliotek etc.

Pris: 2:— kr per år.

Adress: Voxnegrand 24,

121 60 Johanneshov.

Postgiro 20 65 88

# Komuniko de la akademio de Esperanto

Daŭrigante sian pretigon de la 8-a "Oficiala Aldono al la Universala Vortaro", kaj de la "Baza Oficiala Radikaro", kiujn mi esperas povi publikigi baldaŭ en dua kajero de la "Aktotoj de la Akademio", la Akademio jam voĉdonis pri du gravaj punktoj, kaj alvenis al decidoj jenaj:

1. La Akademio, post vastaj internaj diskutoj, malkonsilas la uzadon de la prepozicio PO por esprimi la rilaton indikitan per la frankcistreko en esprimoj kiel 30 km/h kaj similaj, kiel rektan eraron kontraŭ la ĝusta signifo de tiu prepozicio, difinita de Zamenhof en unu Lingva Respondo.

Manke de specifa prepozicio por tia uzado, la Akademio lasas liberecon al fakuloj elekti inter la prepozicioj EN, JE, POR aŭ SUR, laŭ la cirkonstancoj, aŭ uzi adverban formon, kiel "30 kilometroj(n) hore".

2. La Akademio, konsiderante, ke la Lingva Komitato, kiam ĝi en 1922 malkonsilis la enkondukon de la sufikso -io por formi landnomojn, bazis sian decidon sur la konstato de la tiam uzado:

konstatante ke nuntempe, malgraŭ tiu oficiala malkonsilo, la uzado de tiu sufikso -io ne malkreskis, sed male disvastiĝis;

memorante la vojon, indikitan de Zamenhof en la Antaŭparolo al la Fundamento por ebligi senrompan evoluon de la lingvo, kaj konsistantan en la propono de formo nova, uzebla paralele kun la malnova formo;

# Juan de Timoneda

(hispano, 1490—1583):

## TEMPO TRO RAPIDAS

*Tempo tro rapidas, panjo, do mi diras sen skrupul': sola, mi ne dormos plu.*

*Kiel saĝa junulino, ĝui junon mi aspiras, certe ankaŭ vi deziras, ke ne velku mia sino. Jes, ripetos mi sen fino kion mi jam diras nun: sola, mi ne dormos plu.*

*Iu viro min tre amas, volas esti al mi sklava. Mi aspektas ne senrava, en la lito baldaŭ flamas. Mankas io? Io lamas? Diru, mankas io? Ĉu? Sola, mi ne dormos plu.*

*Ne 'stas mi negrino kruda ignorata de Amoro, sed knabino kiel floro, bela kiel perlo nuda. Sola dormu damo pruda pro principo, sen plezur'. Sola, mi ne dormos plu.*

*Mia korpo estas bela, tion montras miaj kruroj, la mieno, la femuroj, la lanuga karno bela. Panjo, longas tro, sencela, nokto sen viobrakeum'. Sola, mi ne dormos plu.*

*Mankas al virin' trankevilo, kiam ŝi dum nokto solas; viron ĉiu damo volas sub la sama lit-kovrilo. Mankas ploro, mankas trilo al virino sen parul'. Sola, mi ne dormos plu.*

Tradukis: F. de Diego

(El BOLETIN, la hispana esperanto-revuo)

opinion, ke la okazo de la sufikso -io apud la fundamenta -ujo por ricevi pli internaciajn formojn de landnomoj estas ĝusta apliko de tiu Zamenhofa uzado;

kaj, nuligante la antaŭan malkonsilon de la Lingva Komitato, sed ne ŝanĝante ĝin al rekomendo, lasas al la ĝenerala uzado libere decidi pri la venko de la pli oportuna formo.

La Prezidanto de la Akademio, G. Waringhien



## Ni legis

LA LANTERNISTO kaj aliaj prozaĵoj. Elektis kaj tradukis D-ro Kazimierz Bein (Kabe) Represo 1973. Dansk Esperanto-Förlag.

Tuta fasko de polaj aŭtoroj estas prezentitaj en tiu ĉi volumo. Entute 14 kun 23 noveletoj. De tiuj mi volas menci: Ĉe LA FONTO; bela kaj interesa amrakonto kun neatendita fino kaj fragmento de QUO VADIS? streĉa sceno je la Roma Cirko kiam la fortega Ursus luktas kontraŭ grandega urso por savi la junan Ligion.

Aŭtoro de la du menciitaj estas Henryk Sienkiewicz. Novelo de M. Konopnicka, MIA ONKLINJO, kiu tre vive kaj kun akompano de viglaj hundboj rakontas kiel la ĉasta fraŭlino Konstanco ricevas knabon kvankam ŝi energie protestas.

La libro aperis unufoje en la jaro 1905 kun antaŭparolo de Profesoro Th. Cart.

Kiel finvortoj mi volas citi el Enciklopedio de Esperanto: "La granda merito de Kabe estas lia influo rilate al la evoluo de la esperanta prozostilo. Lia lingvaĵo estas pura, klara, simpla, vere eleganta — — —" Do vere leginda libro! Mendu de libroperanto en via klubo aŭ de Förlagsföreningen Esperanto. Dana prezo 25: — dkr. Al la sveda prezo (laŭ aktuala kurzo) aldoniĝas varimposto.

bla

PATROJ KAJ FILOJ. Romano de I. Turgenjev. El la rusa lingvo tradukis. D-ro Kazimierz Bein (Kabe). 3-a represo 1973. Dansk Esperanto-Förlag.

Kiam mi komencis legi, mi ekhavis la impreson ke la libro estis peza, sed iom post iom la diversaj personoj, la rolantoj en la libro kaptis mian atenton. La karakteroj estas lerte pentritaj. Bazarov, tiu komplika homo kiu sentis malestimon kaj indignon pri la vivo kaj pri la kunhomoj estis liberigita de la morto. Pri siaj aliaj kreaĵoj la aŭtoro estas bonvola. Ni legas pri amo kaj ankaŭ pri duelo, sed ne tro da sango fluis.

Je la fino okazis edziĝa festo kun du feliĉaj paroj. Nikolao Petroviĉ kiu dum kelkaj jaroj estis vidvo, prenis kiel edzinon Renička, lia amantino, simpla virino el la popolo. Ilia filo, la eta Mitja nun iĝis legitima. Arkadio, la plej aĝa filo de Nikolao Petroviĉ edziĝis kun Katja — — —

Jen iomete de la enhavo. Vi povas mendi ĉe Förlagsföreningen Esperanto, Malmö. Dana prezo 25: — dkr. Al la sveda prezo (laŭ aktuala kurzo) aldoniĝas varimposto.

bla

## AMUZAJ DIALOGOJ EN ESPERANTO

Värde av språkstudier förstår man bättre, om man lyckas både skriva och tala det språk, som man börjat studera.

UEA har gett ut läseboken Amuzaj Dialogoj en Esperanto, och den innehåller 20 dialoger med 2 000 meningar för konversation. Frågor och svar gör det möjligt att öva sig i att tala Esperanto. Tjugo helsidestekningar illustrerar dialogerna. Efter varje dialog finns undervisande frågor och svar. Förordet ger kursledarna värdefulla råd.

Denna läsebok är både roande och lärorik. Vackert tryckt på lyxigast papper i ett bra fickformat. Synes vara starkt häftad.

Enligt utgivaren avser boken att underlätta för nya elever att lära sig tala Esperanto. Dock: Den som inte är speciellt skicklig i språk behöver nog åtminstone två års studier för att självständigt kunna tillgodogöra sig den största delen av texten. Om det vore ekonomiskt möjligt skulle det vara en jättebra sak att bifoga en paragloss för att hjälpa nybörjarna. Är någon beredd att skriva en esperanto-svensk ordlista för hektografering? Utan en sådan är det inte bara verkliga nybörjare som behöver en hjälpare. Boken innehåller också ett antal ord som man måste söka i Plena Illustrata Vortaro.

Men även vi andra behöver verkligen en sådan bok och jag rekommenderar den varmt. Studieleddarna kommer säkert att uppskatta detta hjälpmedel. För konversationskurser är boken självklar.

Den kostar bara sv. kr. 10: 90 vid beställning hos Esperantoförlaget, Malmö.

So so

## GROT-ESPLORADO

Jus aperis la 4-a eldono de la svedlingva verko "LUMMELUNDA-GROTTORNA" de la fama speleologo Leander Tell, ĉe la Eldonejo CENTROCOMMERCE AB en Norrköping, kun resumoj en la angla, finna, franca, germana k. Esperanta lingvoj (40 p.).

En la resumo en Esperanto ni legas, ke temas pri la Groto de Lummelunda, 13 km norde de Visby, sur la baltik-mara insulo de Gotlando (Svedlando). Oni konas ĝin de jarcentoj kiel groton en kiu ekaperas subtera rivero. Pri tiu ĉi fenomeno ni legis mension de Carl von Linné. Leander Tell prezentas al ni riĉajn detalojn sciencajn kaj praktikajn pri tiu interesa kaj vizitinda groto.

T. M.

## Grava evento tra nia gazetaro

Eble ŝajnas strange, ke ni konsideras la daŭran aperon de LITERATURA FOIRO kiel gravan eventon. Ni al kutimiĝis al tia sanstato de niaj literaturaj eldonaĵoj, ke mem la pluvivo de avangarda literatura revuo ĝis jam la kvina jaro (kun 22 numeroj en la unuaj kvar) efikas preskaŭ mirakle.

LITERATURA FOIRO naskiĝis pro la streĉoj de Giorgio Silfer, kun la kunlaboro de la itala literatura rondo "La Patrolo", kiu konsistas el multaj italaj esperantistoj kunigitaj pro sia amo kaj intereso al la literaturo, precipe al la plej freŝa nuntempa Esperanto-literaturo. La revuo de la komenco ne estis multe atentata: eĉ la "grandaj" revuoj nur priflustris ĝian aperon, tiel ke la abonoj venis malrapide, nur de personoj kiuj hazarde konis iun el la redaktoroj. La revuo tenas sin per malmultekosteco (nur 15 respondkuponoj por jara abono, kun specialaj tarifoj por la jam multaj landoj kun peranto), ĉar la reproduktometodoj estas vere la plej malkaraj; sed la perfekta akordigo inter ĉefredaktoro Silfer, la grafikeksperto kaj la ilustristinoj kreas originalajn paĝarangojn, tiel ke la gazeto estas sendube unu el la plej belaspektaj en la internacia lingvo.

Celo de la revuo estas pluraj: transporto de nuntempaj italaj verkistoj sur internacian arenon, bibliografio dokumentita de la Esperanto-verkistoj, forumo por amika diskutado kaj polemikado inter aŭtoroj kaj kritikistoj, valorigo de nuntempaj verkoj, arta kribrado kaj kritikado de kelkaj trajtoj de la nuntempa socio. Ĉu tro ampleksa tasko? Legu mem!

Carlo Minnaja

Kun la ĉi-supra artikolo de Carlo Minnaja ni ricevis du provnumerojn, kiuj atestas pri la bela aspekto kaj alta kvalito de la revuo, kiun ni forte rekomendas. La abonprezo por 1974 ĉe Eldona Societo Esperanto, Malmö, estas 13: — svedaj kronoj.

La red. de La Espero

Ni vendas ĉiujn librojn  
ESPERANTOFÖRLAGET  
Fack 200 42 MALMÖ Pg. 578-5



# MOND-CIVITANO

Dum 14 tagoj en majo kelkaj urboj havis viziton de Renée kaj Roger Volpelière el Nimes en suda Francio. Renée estis invitita prelegi pri la mondcivitana movado. Ŝi faris 6 prelegojn kaj auskultis ŝin proksimume 150 personoj. Pluraj el la kluboj invitis diversajn "svedajn" grupojn, ekz. la mondfederalistojn.

En sia prelego s-ino Volpelière i. a. rakontis pri la mondcivitana movado, ke ĝia unua celo estis nur porĉiama forigo de la mondmilitoj. Poste gravega problemo forigi ĉiujn armilarojn. Tiuj ĉiujare kausas senutilajn elspezojn; grandegaj sumoj, kiuj samtempe mankas por la teknika helpo al la subevoluintaj landoj. Tamen evidentigas, ke la nacioj neniam senarmigos sin, se ili ne estos devigataj de supernacia institucio. Ŝajnas, ke la grandaj nacioj volas eviti ĝeneralan militon, sed v-lonte akceptas "malgrandajn" militojn, tipo Vjetnamio, Mez-Oriento.

S-ino Volpelière ankaŭ menciis la naskiĝeksplozon kaj la sekvojn de tiu. Jam nun  $\frac{2}{3}$  de la monda loĝantaro ne havas sufiĉe por nutri sin, milionoj da infanoj mortas pro malsato. Pripensu bone, ke la loĝantaro monda estas duobligata ĉiun 30-an jaron. Tio signifas, ke la monda loĝantaro post 60 jaroj estos pli ol 10 miliardoj. Kiel ili povos nutri sin? Se ni ne povos en ia maniero reguligi la naskiĝkontrolojn, tio signifas, ke pli kaj pli da homoj mortos pro malsato.

Ni en la riĉaj landoj devos rezigni pri altigitaj vivkondiĉoj, ĉar ni ne eterne profitu je la mondaj riĉaĵoj. Ekz. ni en Svedio kun 8 milionoj da homoj uzas pli da energio ol Hindujo kun 400 milionoj. Kaj tiun energion ni ja prenas el la komuna liverejo de la homaro.

Estas ankaŭ multaj aliaj aspektoj pri la homara ekzistado, kiujn ni devos pripensi. Ekz. oni jam scias, ke la trinkebla akvo mankos iun tagon. La oksigeno malpliigas, i. a. pro ĉiuj aŭtoj kaj la supersonaj aerŝipoj, kiuj uzas amasojn de tiu, kaj pro la senarbigo por industria kaj agrikulturaj celoj, kio malĉebigas sufiĉan kreon de nova oksigeno. Jam oni devas, ekz. en Tokio, de tempo spiri iom de tiu vivnecesa gazo el specialaj aŭtomatoj.

La lastan okazintaĵon, kiu montris kiel vundeblaj estas eĉ niaj riĉaj landoj, oni travivis pasintvintre, kiam la oleaj landoj altigis la prezojn kaj eĉ neis liveri, kaj pro tio en multaj landoj tiamaniere ŝanĝigis la ekonomia situacio. Post tio komencis akra kaj senkompata interluktado por akiri energiajn fontojn.

De kelkaj jaroj la internacia vivo

ankaŭ estas vere ĥaosa kun altiĝo kaj malaltiĝo de la diversaj valutoj. La financaj ministroj el la diversaj landoj ne plu scias kion fari por ke tiu ĥaoso ĉesu.

Laŭ la mondcivitanoj tio estas problemoj nesolveblaj, se oni ne radikale ŝanĝu la politikan strukturon de la mondo. La nacioj ne plu estu kontentaj pri duopaj kontraktoj. Anstataŭe ni provu krei federacian estraron kun Asembleo de la Popoloj kaj Asembleo de la Ŝtatoj. Tiu strukturo povus esti starigata per aliigo de UNO, kies kontrakto laŭstatute povus esti ŝanĝita. La mondcivitanoj volas krei vastan movadon, kiu puŝus la registarojn al aliforigo de la kontrakto de UNO. La celo estas Monda Popola Asembleo Konstituciiga. Ĝus nun tio ŝajnas iom utopia, sed pli kaj pli da eventoj en la internacia vivo devigos la klerulojn konsciigi pri la neceso starigi internaciajn institutojn por solvi la komunajn problemojn. Tio ja estas direkto al monda registaro.

Ekzistas ankoraŭ multaj gravaj demandoj, kiujn povos solvi nur supernacia institucio.

Tamen restas la ĉefa afero: konvinki la homojn pri la neceso de nova organizo de la mondo sur federacia fundamento, ĉar neniam ni povos realigi la tutmondajn plibonigojn, se supernacia institucio ne planas kaj agas.

Post la prelego sekvis debato kaj ĝi iĝis ofte tre vigla. Plej bona ĝi estis, kompreneble, en tiuj lokoj, kie partoprenis nur esperantistoj. Ĉiam estas ĝene traduki ĉiun vorton, ĉiun frazon kaj ankaŭ estas temporaba. Sed la ekstera publiko donis valoran kontakton kun aliaj grupoj kun internacia laboro en sia programo.

Märtha Andréasson

## Ni gratulas al

Sven Möllestad, Kramfors, entuziasma kaj akiva esperantisto, respektata en vastaj rondo. Li fariĝis 60-jara 26/5 1974.

Nils Johansson, Norrköping, 60-jara 13/7. Ankaŭ malnova batalanto kaj gvidanto de aktiva klubo, ĝis la jar-kunsido en Borlänge estrarano de SEF.

## Lernu per la eraroj

"La ordinara prezidanto estis elektata gvidi la kunsidon kaj reelektata kiel prezidanton." La akuzativa finaĵo ĉe la finvorto estas evidente erara.

Do la ĝusta formo: La ordinara prezidanto unue estis elektata gvidi la jarfinan kunsidon kaj poste reelektata kiel prezidanto por la nova jaro.

Oni povas ankaŭ uzi pli simplan formon (evitante la pezan formon de kunmetita verbo), ekz. Komence de la kunsido oni elektis la ĝisnunan prezidanton por gvidi la traktadon, kaj poste ankaŭ reelektis lin por la nova agadjaro.

### Pri elekto —

(ni legas en Plena Ilustrita vortaro):  
1) elekti (transitiva) El du aŭ pluraj preni pro prefero. Ekz. La Komitato ricevis la komision nur elekti lingvon (Zamenhof).

2) Montri per voĉdonado preferon por kandidato. Ekz. Elekti deputiton, prezidanton, papon.

### — de prezidanto:

KIEL Partikulo kun la signifo "estanta", "en la funkcio de, havanta la identecon de": Oni petis lin kiel prezidanton, ke li intervenu.

T. M.

## INTERNACIA KUNLABORO CELAS EDUKON DE RIFUGINTOJ

SIDA (Sveda Internacia Evoluiga Instanco) donacas \$ 60 700 por establi lernejan konstruaron por infanoj rifugiĝintaj el Angolo. Ĝi staros en Doliso, Popola Respubliko de Kongo.

## KOMUNA LINGVO POR ORIENTA AFRIKO

Eminentaj edukistoj el Tanzanio, Kenjo kaj Ugando kunlaboros kun registaraj kaj aliaj instancoj por pliiĝi la jam kreskantan uzon de la lingvo svahilo kiel komuna lingvo tra la tuta Orienta Afriko. Bazajn studojn, evoluigon de uniformaj ortografio, gramatiko, prononco kaj vortprovizo prizorgos la Interuniversitata Konsilio de Orienta Afriko (IUC), kiu provizos ankaŭ la eblecojn instrui svahilon je la nivelo de la pli alta eduko. Laŭ la Internacia Instituto por Studoj pri Eduko, en Bruselo, la uzo de svahilo rapide kreskis dum la pasintaj dek jaroj.



# VETERANOJ FORPASIS

**BENGTSSON en Krylbo**

La ŝuisto Karl Bengtsson mortis la 26-an de junio, 75-jara. Kamaradoj el la Esperantoklubo de Krylbo ĉeestis la enterigan ceremonion en Folkärna.

Karl Bengtsson estis homo tre konata en esperantistaj rondoj. Dum multaj jaroj li fidele partoprenis preskaŭ ĉiun ĵarkongreson de SEF, kaj antaŭ nur kelkaj jaroj li respondis por la protokolo je la ĵarkunsido. Li ĉeestis ankaŭ plurajn Universalajn Kongresojn kaj aperis je multaj aliaj esperantistaj aranĝoj.

Ni kiuj konatiĝis al li trovis tre bonkoran kaj vastaniman homon, kiu modeste vivis sed multe legis kaj profunde pensis. La morto liberigis lin de kelkjara malsano, kiu malebligis al li esti inter ni, kaj ni jam de kelka tempo sentis la grandan mankon.

**AB**

**NILS HUGO NILSSON kaj HENRY FABRICIUS, Malmberget**

Du grandaj batalantoj por esperanto mortis preskaŭ samtempe, N. H. Nilsson 31/5 kaj Fabricius 4/6 1974. Ambaŭ entuziasmiĝis dum la kursoj de Henrik Seppik en la 30-aj jaroj.

**HJALMAR LEYDEN, Höör,**

fidela esperantisto, forpasis antaŭ kelkaj monatoj, laŭ ĵus ricevita informo.

**HERBERT LEVI, Nybro**

Lingvoinstruisto Herbert Levi mortis antaŭ pluraj monatoj, 69-jara. Li naskiĝis en Germanujo kaj venis al Svedujo en 1933. Li funkciis kiel lingvoinstruisto en ABF, i. a. en Jönköping, Halmstad kaj Kalmar. Dum la lastaj jaroj li aktivis en la Esperantoklubo de Nybro kaj estis je sia morto gvidanto de kurso por komencantoj.

# Infankurso en Västerås



Ses knabinoj en Västerås ekstudis esperanton (vidu la bildon). Tio estas la rezulto de la prelego kiun faris Wim Posthuma por infanoj en la 4-a klaso, pri kiu ni raportis en la antaŭa numero. S-ino Elsie Möller gvidas la rondon.

La rezulto de la lerneja kampanjo en unu altstadia lernejo estas, ke 17 gelnantoj anoncis sin por esperantokurso de TBV (studorganizaĵo) kiu komenciĝos aŭtune.

## JUNA RONDO EN TIBRO

En Skövde Nyheter ni trovis artikolon pri la geknaboj de la skolta grupo Juna Rondo (apartenanta al la Sveda Misia Asocio), kiuj eklernis esperanton en kurso gvidata de Stig Kinnander. Ili komencis interŝanĝi bildkartojn kaj jam havas kontaktojn kun esperantistaj geknaboj en 20 landoj. Oni planas aranĝi ekspozicion per la ricevataj bildkartoj nun aŭtune, kaj oni ankaŭ intencas aranĝi kune kun novakiritaj geamikoj diverslandaj konkurson pri desegnaĵoj.

## INSTRUADO POR PACO

"La instrua profesio povus influu porpacan agadon je niveloj lokaj, naciaj kaj internaciaj." Tiel diris Prezidento Jomo Kenyatta de Kenjo, inaŭgurante porpacan kampanjon, kiun lanĉis la Monda Konfederacio de Organizaĵoj de la Instrua Profesio (WCOTP) kaj la kvin milionoj da instruistoj, kiujn ĝi reprezentas. Prezidento Kenyatta parolis ĉe la Ĝenerala Asembleo de WCOTP la pasintan aŭguston en Najrobi, Kenjo. Li petis pli vastan interŝanĝon de ideoj kaj informoj kaj helpon en la gvidado de gejunuloj al "respekto kaj aprezo de la rajtoj de aliaj homoj, kaj samtempe la surpranon de sia propra respondeco por la socio". WCOTP esperas organizi kunvenon venontjare en Parizo kun aliaj internaciaj societoj, tiel ke instruistoj ĉie povu antaŭenigi la bonfarton de la profesio kaj de paco en la mondo.

Konstrui per

# YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure

## YTONGBOLAGEN

Hällabrottet



# FUNKCIULOJ DE SEF

## ESTRARO

- Jan Strönne, prezidanto  
Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö,  
tel. 040-12 92 11.
- Franko Luin, vicprezidanto  
Mygdalsvägen 123, 135 00 Tyresö,  
tel. 08-712 82 91.
- Sven Alexandersson, kasisto  
Krokvägen 85, 122 32 Enske,de,  
tel. 08-49 80 24.
- Tomas Jansson, sekretario  
Wigeliävägen 58, 712 00 Hällefors,  
(tel. somere 0591-120 90)
- Märtha Andréasson, vicsekretario  
P1 2265, Tolsered, 425 90 Hisings  
kärra, tel. 031-57 11 33.
- Ulla Luin, oficeja administranto  
Mygdalsvägen 123, 135 00 Tyresö,  
tel. 08-712 82 91.
- Bertil Åkerberg  
Lillsvängen 39, 126 57 Hägersten,  
tel. 08-46 29 95.
- Ragnar Hjorth, anstataŭanto  
Kronobergsgatan 25, 4 tr ö. g.,  
112 33 Stockholm, tel. 08-52 76 67.
- Gunnar Farm, anstataŭanto  
Svarvargatan 9 A, 723 37 Västerås,  
tel. 021-18 87 87.

## A-KOMITATANOJ

Jan Strönne  
Ulla Luin

## REPR. EN ESTRARO DE LA INSTITUTO

Jan Strönne  
Sven Alexandersson  
Ulla Luin, anstataŭanto  
Åke Blomberg, anstataŭanto

## ELEKTROPREP. KOMITATO

Nils Johansson, kunvokanto  
Aino Mäkinen  
Tomas Jansson

## LJK HALMSTAD

Gunnar Tengling, prezidanto  
Knut Peters väg 26, 302 41 Halm-  
stad, tel. 035-357 47.


Tage Olsson, sekretario  
Vita Bandsvägen 13, 302 40 Halm-  
stad, tel. 035-359 87.

Sven Berlin, kasisto  
Österängsgatan 4, 302 53 Halmstad,  
tel. 035-10 22 85.

# VENONTA NUMERO

Limdato por manuskriptoj:  
6 septembro.

# Ere—parkere



# Korespondas

Jenő Zsellér  
H. 4962 Nagyszekeres  
Toldi u. 2.  
Hungario  
25 jara, pri diversaj temoj.

S-ino Viktoria Bornstad, ö. Pro-  
menaden 14, S-602 27 Norrköping.

1. Avarulo pagas duoble
2. Bona vino al la fino
3. Ĉiu havas sian kaŝitan mizeron
4. Ankoraŭ la ezoko ne estas sur la hoko

## FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Adreso: Esperantoförlaget, Fack,  
200 42 Malmö 7  
Ejo: Möllervångsgatan 20 B

★

Dejortempo 1 sept.—15 majo:  
merkredo 10.00—11.00  
ĵaŭde 17.00—18.00

Skribaj mendoj ekspedataj dum la  
tuta jaro.

Tel. 040 / 12 20 29. Postgiro 578-5.

★

Administranto: Anna-Greta Strönne  
Tel. hejma 040 / 12 92 11

Prez. Sven Sjöblom

# La Espero

Svenska Esperantotidningen

Organ för Sv. Esperantoförbundet,  
Fack, 122 04 Stockholm-Enske,de.  
Hägervägen 31.

Postgirokonto 20 12-3.

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg.  
Redaktör: Åke Blomberg, Lidåkers-  
gatan 6 C, 531 00 Lidköping.

Tel. 0510-286 42 (arb. 0510-221 30).  
Medlemsavgift för direkt medl. 25 kr,  
ungdom 10 kr, familjemedlem utan  
tidning 5 kr.

Prenumerationspris 25 kr.

Förbundets sekretariat är öppet  
onsdagar kl. 18—20, tel. 08-48 99 76.

Sturetryckeriet AB - Stockholm 1974